

PRINCO DE LA ĈIELAJ LEGIAROJ

Ĝis ŝanĝo de liturgia kalendaro havis ĉiu el tri ĉefanĝeloj sian apartan festotagon. La festotagon de s-ta ĉefanĝelo Gabrielo oni festis unu tagon antaŭ la festo de Anunciacio, feston de s-ta Rafaelo la 24-an de oktobro kaj feston de s-ta Miĥaelo ĉefanĝelo la 8-an de majo.

Tiu dato interrilatis kun apero de s-ta Miĥaelo sur monto Gargano en Manfredonio en suda Italio. Tiuloke poste li aperis en tri diversaj periodoj. Unuan fojon en la jaroj 490-495, kiam li trifoje aperis al loka episkopo L. Maloriani, unuan fojon ĝuste en la 8-a de majo 490, kiam li indikis al li groton, kiun li mem elektis kiel sian sanktejon, por ĝin transdoni al kristana kulto. Tiu „ĉiela baziliko“ sur la monto Gargano en Manfredonio situas 50 km for de tombo de Patro Pio estanta hodiaŭ celo de ĉiam pli multnombraj pilgrimantoj. La dua apero ĉi tie okazis la 29-an de septembro 492, kiu kaŭzis forkuron de gota armeo tendumanta sur deklivo de la monto. Dum la granda dankprocesio, kiu poste almigris la monton, neniu kuraĝis eniri la groton de s-ta Miĥaelo. Dum la tria apero en la 28-a de septembro 493 diris s-ta Miĥaelo al la episkopo, ke ne estas necese, ke li sanktigu la groton: »Mi mem ĝin kun miaj anĝeloj ĝin sanktigis. Kiel signon de tio vi trovos klaran signon de la sanktigo: la altaron.«

Plua apero tie okazis en la jaro 1022, kiam tie mirakle estis resanigita bavaria grafo Erich Hinkende. Atestanto de la apero estis mem imperiestro, kiu tiam batalis kontraŭ grekoj ekatakantaj sudan Italion.

En la jaro 1656, kiam la tutan Italion atakis pesta epidemio, ordonis episkopo Pulcinelli tritagan faston kaj pilgrimon al la groto de s-ta Miĥaelo. En tiu pilgrimo s-ta Miĥaelo aperis la 22-an de septembro al la episkopo dum lia preĝo kaj ordonis al li, ke li en ĉiun familion transdonu ŝtoneton el la groto signitan per gravuritaj simboloj S+M.

Li ankaŭ antaŭdiris tertremojn, kiu okazis la 17-an de oktobro 1656 kaj dum kiu estis Manfredonio evitita.



Sankta ĉefanĝelo Miĥaelo sur Anĝela Kastelo en Romo

En plua tertremo en la jaro 1688 restis la statuo de s-ta Miĥaelo super portalo nedifekta, sed ne la staturo de drako ĉe liaj piedoj.

Sankta ĉefanĝelo Miĥaelo havas ankoraŭ pluajn gravajn pilgrimlokojn sur la mapo de la mondo. Ĝuste cent jarojn post la apero de la Virgulino Maria en Guadalupe kaj cent kilometrojn suden de tiu pilgrimloko aperis s-ta Miĥaelo en sia festotago la 8-an de majo 1631 en Capula al indiana indiĝeno Diego Lazar kaj montris al li ŝliman akvon, kiun li per lumo transformis je viva akvo, kaj elpelis demonojn, kiuj kontraŭstaris tion. La ĉefanĝelo Miĥaelo tiam kun granda severeco agis kontraŭ la viziulo, kiu pro timo rifuzis antaŭ gubernatoro montri la miraklan fonton al la publiko.

En la jaro 590 en tempo de la pesto

aperis ĉefanĝelo Miĥaelo en Romo al papo Gregoro la Granda dum petema procesio sur supro de kastelo de Hadriano. Kiel signon, ke Romo estos senigita de la pestvundo, enmetis Miĥaelo en ingon sangmakulitan glavon. La kastelo de Hadriano nun nomiĝas Anĝela kaj ĝi estas ornamita per granda statuo de s-ta Miĥaelo ĉefanĝelo.

La eklezia historio ankoraŭ konas pluajn okazojn de la aperoj kaj intervenoj de tiu ĉi ĉiela princo de la ĉiela armeo. Lasta el ili okazis en la jaro 1966 en San Damiano (Perugia), kie la ĉefanĝelo Miĥaleo indikis lokon, kie oni serĉu fortan akvofonton, kiu poste fakte estis trovita. Verecon de tiu ĉi apero konfirmis Patro Pio. ■

Laŭ eksterlandaj fontoj